

Sufikso –ar/o

La sufikso –ar/o reliefigas la apartenon al kolekto de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj formanta unu tuton absolutan aŭ grupiĝon en limigita unuaĵo.

	Tuto absoluta	Grupiĝo en limigita unuaĵo
homo	La homaro	Ø
birdo	La birdaro	Ĉiele flugas ansera birdaro.
gazeto	La gazetaro	La svisa gazetaro krizas.
libro	La esperanta libraro	Riĉas la libraro de CDELI.
estro		La estraro de la urbo kunsidas.
haro		Knabino kun bela bukla hararo.
ŝtupo		Impona kastela ŝtuparo.
arbo		Promeni en vasta arbaro.
verki		La originala verkaro de Zamenhof.
viro		La viraro de la vilaĝo ekskursas.
ŝafo - kampo		La ŝafaro paŝtas en la kamparo.
abelo		El la abelujo forflugis abelaro.
vorto	La esperanta vortaro	Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.
alpo - monto		Alparo estas vasta montaro.
horo		La fervoja horaro ŝanĝiĝis.
adreso		La adresaro de la klubanoj.

Aro: La sufikso –ar/o memstariĝis kun la limigita signifo de nombro da samspecaj aĵoj aŭ estoj aŭ kolekto de aĵoj formantaj tuton.

Tie kuŝis **aro** da dehakitaj arboj.

Ili ellernis **aron** da vortoj.

Venis **aro** da homoj.

Babilas **aro** da lernantoj.

Niaj kluboj grupigas **areton** da ĝeamikoj.

Ni **arigu** la slipojn laŭ alfabetaj subaroj.

Tiu disertacio estas nur **arigitaj** citaĵoj.

Alvenis **arego** da aĉetemuloj.

La publiko **ariĝas**.

Are la homoj ofte ŝovinismas.

Pri la vorto homaro

Unu el la kulturaj karakterizaĵoj de la esperanta lingvo estas la absoluta rifuzo koncepti la terminon **homaro** por difini limigitan grupon da homoj. Tial esperantlingve **homaro** neniam sinonimas al gento, popolo, tribo, nacio. Esperantlingve ekzistas nur unu sola homaro, la tutmonda. Tiu vortfarada escepto kontraŭ la duobla rolo de la sufikso –ar/o rezultas el la penso mem de Doktoro Esperanto, kiu filozofie rifuzis la dividon de la homoj en plureco da «homaroj», tio estas en plureco da hom-grupoj, kiujn apartigus malsimileco da lingvoj, religioj, haŭtkoloroj, naciaj devenoj, kutimoj, ktp.